

Analizo de la "Tria provizora raporto" pri la platformo de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo (novembro 2021)

Ekde aprilo 2021 eŭropuniaj civitanoj eblas partopreni la civitanan konsulton de la "Konferenco pri la estonteco de Eŭropo" per propraj proponoj kaj per voĉdonado kaj komentado de ekzistantaj proponoj. Tiucele la Konferenco starigas platformon uzeblan en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU.

"Provizoraj raportoj" pri la platformo estas publikigataj de la Konferenco:

<https://futureu.europa.eu/pages/reporting> (tie alklaku "provizora raporto pri la platformo" je la fino de la teksto). Haveblas tri raportoj:


- unua provizora raporto (periodo ĝis 2021-08-02, publikigita 2021-09)
- dua provizora raporto (periodo ĝis 2021-09-07, publikigita 2021-10)
- tria provizora raporto (periodo ĝis 2021-11-03, publikigita 2021-12)

La raportoj informas pri la uzo de la platformo kaj analizas tiun uzon, enhavas resumojn laŭ la diversaj temaroj kaj listigas la proponojn kun la plej granda nombro de **apogantoj** kaj kun la plej granda nombro de **komentoj** en ĉiu de la naŭ temaroj de la Konferenco.


Kiu partoprenis ĝis nun?

La analizo uzas la informojn, kiujn partoprenantoj donis en la platforma demandaro pri si mem. Ĉirkaŭ kvinono ĝis kvarono de la partoprenantoj respondis ne ĉiujn (aŭ neniujn) demandojn, do ilia loĝlando/ŝtataneco, aĝo, sekso ktp. ne estas konataj.

Loĝantoj de iuj landoj partoprenis pli ol loĝantoj de aliaj landoj (29 % de partoprenintoj ne deklaris iun landon). Iĉoj (57 %) estas pli nombraj ol inoj (15 %), sed multaj (28 %) ne deklaris sian sekson.



Nombro de kontribuoj
(proponoj, komentoj
kaj eventoj) laŭ lando




Nombro de kontribuoj
(proponoj, komentoj
kaj eventoj) po unu
miliono da loĝantoj


La plej aktivaj aĝgrupoj estis homoj inter 55 kaj 69 jaroj (21 %) resp. 25 kaj 39 jaroj (19 %).

Aĝo de la partoprenintoj

- ne deklarita
- 15-24 jaroj
- 25-39 jaroj
- 40-54 jaroj
- 55-69 jaroj
- 70 jaroj kaj pli



Kiuj temoj plej interesis eŭropanojn?



Raportaj resumoj

Post tre ĝenerala resumo, kie troviĝas jena frazo: *"sugesto de komuna lingvo unuiga estas larĝe trovebla en la tuto de la retejo en diversaj temoj"*, la raporto resume analizas la proponojn en la platformo laŭ la naŭ konferencaj temaroj. La redaktintoj prilaboris la datumojn de la retejo ĝis la 3a de novembro 2021.

Unu el la temaraj resumoj en ĉi tiu tria (novembra) raporto **ŝanĝiĝis** koncerne lingvojn kompare al la antaŭaj raportoj (temaro "Edukado, kulturo, junularo kaj sporto").

Resumo de la temaro "Eŭropa demokratio"

En la paragrafo "Lingvoj kaj promocio de eŭropa spirito":

"Multaj partoprenantoj diskutas pri ideo elekti komunan lingvon por ke la civitanoj de tuta EU interkomuniku kaj pli bone komprenu reciproke (vidu ekzemple tiun ideon¹), ankaŭ pri propono celanta havi Esperanton kiel unuiga lingvo (vidu ekzemple tiun ideon²). Tiuj du proponoj vekigas

1 <https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/43>: "Ni bezonas komunan eŭropan lingvon" (proponinto Christian Ciavatta), ne proponas iun specifan lingvon sed favoras la anglan.

2 <https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/1304>: "Unu lingvo por la Eŭropa Unio" (proponinto Marco Tuttolomondo), pledas por Esperanto.

malsimilajn opiniojn, ĉu jes, ĉu ne, en la komentoj. Iuj partoprenantoj postulas ankaŭ ke multlingveco estu pli bone respektata (vidu ekzemple tiun ideon³)."

(Ne ŝangita kompare kun la antaŭa raporto.)

Resumo de la temaro "Edukado, kulturo, junularo kaj sporto"

En la paragrafo "Promocii komunan eŭropan identecon":

"La estigo de komuna eŭropa lingvo estas konsiderata kiel ilo por eŭropa integriĝo, laŭ multaj partoprenantoj (vidu ekzemple tiun ideon⁴). Tio estas ankaŭ larĝskale diskutata en la temaro "Pliaj ideoj" (vidu ekzemple tiun ideon⁵). Diskutataj estas diversaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj de iu tia komuna eŭropa lingvo, kaj la diversaj eblaj lingvoj, inter kiuj Esperanto (vidu ekzemple tiun ideon⁶ aŭ tiun ideon⁷), la latina (vidu ekzemple tiun ideon⁸) aŭ la angla (vidu ekzemple tiun ideon⁹). Konversacio pri Esperanto estigis certan intereson en la reto, spegulanta la viglecon de la debato pri la unika neŭtrala lingvo por ĉiuj EU-landoj (vidu tiun eventon¹⁰)."

(Substrekitaj tekstoj estis aldonita kompare kun la antaŭa raporto.)

Listoj de proponoj en la anekso

Aneksa I de la raporto enhavas listojn laŭ temaroj

- ◆ de la kvin proponoj kun la plej granda nombro de apogantoj kaj
- ◆ de la kvin proponoj kun la plej granda nombro de komentoj.

Por-esperantaj proponoj, kiuj aperas en la anekso pro multnombra apogo / multnombra komento, troviĝas en la temaroj (laŭ la vico de la anekso)

- Sano (unu propono)
- Ekonomio (unu propono)
- Valoraj kaj rajtoj (unu propono)
- Eŭropa demokratio (unu propono)
- Edukado (kvin proponoj)
- Pliaj ideoj (du proponoj)

Pro intensa komento jam ekde la fino de novembro pliaj por-esperantaj proponoj estas inter la kvin plej multnombraj apogitaj proponoj en kelkaj temaroj. Vidu la [statistikon](#) publikigitan en la [UEA-vikipaĝo](#). Tiuj proponoj devus aperi en la venonta platforma raporto.

[Kompleta listo](#) de ĉiuj por-esperantaj proponoj ankaŭ troviĝas en la [UEA-vikipaĝo](#).

3 <https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/15976>: "Kontraŭbatali nur anglalingvan publikadon de EU" (proponinto Pierre Dieumegard), pledas por Esperanto.

4 <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/9279>: "Esperanto kiel unua fremda lingvo" (proponinto Kerstin Brunner-Wenusch).

5 <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>: "Esperanto, komuna kaj neŭtrala lingvo, konceptita por facila lernebleco. Nova ilo por pli unuiĝita Eŭropa Unio" (proponinto Enrique Hinojosa de Guzmán Alonso).

6 <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238>: "Unu leciono pri Esperanto por lernejoj en Eŭropa Unio" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven).

7 <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>: "Oficiala agnosko de Esperanto kiel unu el la lingvoj de EU-civitanoj" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven).

8 <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/484>: "Promocii la latinan en eŭropaj lernejoj" (proponinto Rodrigo Arévalo).

9 <http://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/998>: "Fari la anglan dua oficiala lingvo ene de EU" (proponinto Valter Freitas).

10 <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/37/meetings/20659>: Evento "Kial lerni Esperanton estas tiel facila? Lingvo komuna kaj neŭtrala por Eŭropa Unio?" (stariginto Enrique Hinojosa de Guzmán Alonso).

Proponoj en la temaro Sano

Proponoj rilate al etnolingvoj **aŭ** Esperanto menciitaj en la anekso pri ĉi tiu temaro (kun indiko de la pozicio en la listo de la **novembra** raporto *kaj de la antaŭa raporto [inter krampoj]*):

| | |
|-----------------------------------|--|
| plej multnombre apogitaj | — |
| plej multnombre komentitaj | 5. [–] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Health/f/3/proposals/137750 : "Multlingveco en malsanulejoj: instrui la internacian lingvon Esperanto al medicina personalo" (proponinto Klaus Leith) |

Proponoj en la temaro Ekonomio

Proponoj rilate al etnolingvoj **aŭ** Esperanto menciitaj en la anekso pri ĉi tiu temaro (kun indiko de la pozicio en la listo de la **novembra** raporto *kaj de la antaŭa raporto [inter krampoj]*):

| | |
|-----------------------------------|---|
| plej multnombre apogitaj | — |
| plej multnombre komentitaj | 4. [4.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Economy/f/10/proposals/32473 : "Kiom da mono Esperanto ŝparus al la Eŭropa Unio?" (proponinto Enrique Hinojosa de Guzman Alonso) |

Proponoj en la temaro Valoroj kaj rajtoj

Proponoj rilate al etnolingvoj **aŭ** Esperanto menciitaj en la anekso pri ĉi tiu temaro (kun indiko de la pozicio en la listo de la **novembra** raporto *kaj de la antaŭa raporto [inter krampoj]*):

| | |
|-----------------------------------|---|
| plej multnombre apogitaj | 5. [5.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/41119 "Por objektiva, faktbazita informo pri Esperanto! Egalaj rajtoj por esperantoparolantoj!" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven) |
| plej multnombre komentitaj | 4. [4.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/41119 "Por objektiva, faktbazita informo pri Esperanto! Egalaj rajtoj por esperantoparolantoj!" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven) |

Proponoj en la temaro Eŭropa demokratio

Proponoj rilate al etnolingvoj **aŭ** Esperanto menciitaj en la anekso pri ĉi tiu temaro (kun indiko de la pozicio en la listo de la **novembra** raporto *kaj de la antaŭa raporto [inter krampoj]*):

| | |
|-----------------------------------|--|
| plej multnombre apogitaj | — |
| plej multnombre komentitaj | 1. [1.] "komuna lingvo" https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/43 : "Ni bezonas komunan eŭropan lingvon" (proponinto Christian Ciavatta), ne proponas iun specifan lingvon 4. [4.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/1997 : "La eŭropa demokratio komencas per komuna lingvo: Esperanto" (proponinto Blandine Cattier) |

Propoj en la temaro Edukado

Propoj rilate al etnolingvoj **aŭ** Esperanto menciitaj en la anekso pri ĉi tiu temaro (kun indiko de la pozicio en la listo de la **novembra** raporto *kaj de la antaŭa raporto [inter krampoj]*):

| | |
|-----------------------------------|--|
| plej multnombre apogitaj | <p>1. [1.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893: "EU bezonas plibonigitan lingvolernadon" (proponinto Seán Ó Riain), pledas por esperantlingva "Multlingva akcelilo"</p> <p>4. [–] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238: "Lekcio pri Esperanto por lernejoj en Eŭropa Unio" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven)</p> |
| plej multnombre komentitaj | <p>1. [1.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893: "EU bezonas plibonigitan lingvolernadon" (proponinto Seán Ó Riain), pledas por esperantlingva "Multlingva akcelilo"</p> <p>2. [2.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/260: "Lingvoinstruado en Eŭropo" (proponinto: Thomas Hufkens), pledas por Esperanto kiel dua lingvo en ĉiuj lernejoj</p> <p>3. [4.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/63064: "Pli feliĉaj lingvolernantoj, pli sukcesaj lingvoinstruistoj" (proponinto Ludoviko Molnár), pledas por Esperanto</p> <p>4. [3.] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/1536: "Esperanto – internacia helplingo" (proponinto Paolo Pellegrino)</p> <p>5. [–] Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238: "Lekcio pri Esperanto por lernejoj en Eŭropa Unio" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven)</p> |

Propoj en la temaro Pliaj ideoj

Listo por tiu temaro ne aperis en la antaŭaj raportoj.

Propoj rilate al etnolingvoj **aŭ** Esperanto menciitaj en la anekso pri ĉi tiu temaro (kun indiko de la pozicio en la listo de la **novembra** raporto):

| | |
|-----------------------------------|---|
| plej multnombre apogitaj | <p>1. Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955: "Oficiala agnosko de E-o kiel lingvo de EU-civitanoj" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven)</p> <p>2. Esperanto https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399: "E-o, komuna kaj neŭtrala lingvo, konceptita por facila lernado. Nova ilo por pli unuiĝanta Eŭropa Unio." (proponinto Enrique Hinojosa de Guzman Alonso)</p> |
| plej multnombre komentitaj | la du supraj proponoj en inversa vicordo |

Rimarkoj

- Komentado

Komentado de por-esperantaj proponoj utilas!

Aneksa I al la raporto listigas ne nur la plej multnombre apogitajn, sed ankaŭ la plej multnombre komentitajn proponojn. Ni uzu tiun eblon plividebligi por-esperantajn proponojn, per plia komentado en lerta maniero: trafe, koncize, cele al ne-esperantistoj (do ne en Esperanto!).

Ni **ne** komentu malmultnombre apogitajn "kontraŭ-esperantajn proponojn", kiuj nur povus aperi en la listo de la anekso, se ili ricevas multajn komentojn. **Ni ne kontribuu** al la videbleco de kontraŭaj proponoj.

(Ekzemplo: <https://futureu.europa.eu/processes/Economy/f/10/proposals/455>:

"Propono por anglaj urboj en Eŭropo" [kie oni uzas la anglan].)

- "Pliaj ideoj"

Ideoj proponitaj en la kategorio "Pliaj ideoj" ne aperis en la du unuaj raportoj. Tiu kategorio enhavas plurajn por-esperantajn proponojn, kelkaj el ili kun grandnombra apogo/komentado.

Post protestado ĉe la EU-Komisiono kaj la firmao Kantar (redaktoroj de la raporto), tiu kategorio nun estas listata en la Aneksa I kaj tiamaniere videbligas niajn plej sukcesajn proponojn en tiu kategorio (ekz. "Esperanto, komuna neŭtrala lingvo, konceptita por esti facile lernebla"¹¹ kaj "Oficiala agnosko de Esperanto kiel unu el la lingvoj de EU-civitanoj"¹²).

Por proponoj en la kategorio "Pliaj ideoj" ne ekzistas specifa civitana panelo, kiu pritraktas tiujn proponojn kiel kategorion. Laŭ la raporto, la Komuna Sekretariato de la Konferenco disigis ilin al specifaj paneloj laŭ enhava analizo de la proponita ideo.

- Kriterioj por listigo

La kriterioj de listigo en la raporto ne estas evidentaj. Ekzemple, en la temo "Eŭropa demokratio", estas menciita *"Iuj proponoj petas ke estu nur unu kontaktpersono por la tuta EU, kiu parolos unuvoĉe en eksteraj rilatoj (vidu ekzemple tiun ideon¹³)"*. Tamen tiu ideo havis nur unu aprobon, kaj neniun komenton.

- Ĝisdatigo

La redaktoroj de la raporto (eksterna firmao Kantar) reuzis la tekston de la antaŭa raporto kaj aldonis kelkajn informojn pri novaj proponoj. Kelkaj ĝeneralaj rimarkoj rilate Esperanton ŝanĝiĝis.

Analizoj de antaŭaj raportoj:

[Analizo de la unua raporto](#) (periodo ĝis 2021-08-02)

[Analizo de la dua raporto](#) (periodo ĝis 2021-09-07)

11 <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>: "Esperanto, komuna kaj neŭtrala lingvo, konceptita por facila lernado. Nova ilo por pli unuiĝanta Eŭropa Unio." (proponinto Enrique Hinojosa de Guzmán Alonso).

12 <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>: "Oficiala agnosko de Esperanto kiel lingvo de EU-civitanoj" (proponinto Louis v. Wunsch-Rolshoven).

13 <https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/60689>: "Ununura kontaktpersono de EU eksteren" (proponinto EUROPE DIRECT Vorarlberg).